

P

PARZIVAL'

→ Serge REVERDIN

Engelhard PARGÄTZI

1885-1943

Post la gimnazio en Chur/GR P. diplomiĝis kiel instruisto kaj studis filozofion kaj germanistikon en la universitatoj de Bazelo, Zuriko kaj Berno, kie li doktoriĝis. Li fondis la gimnazion Knabeninstitut Rhätia en Klosters/GR, kiu funkciis ĝis 1914. 1922-25 li laboris en maŝinofabro en Rüti/ZH kaj 1925-43 estis redaktoro de *Schweizerische Illustrierte Zeitung* en Zofingen. Kun la baptonomo Rinaldo li membris en la studenta unuiĝo Zofingia. En 1913 li aliĝis al la zurika framasona loĝio Sapere Aude im Orient Zürich (1916 majstro) kaj en 1918 membriĝis en la loĝio Libertas et Fraternitas, kies honora membro li estis.

P. probable estis la unua signifa grizona eisto. Li instruis Eon en la gimnazio de Chur, sukcese propagandis la lingvon ĉe diversaj altranguloj, kontribuis al la starigo de la unua grizona EG (fine de 1906) sub la prezido de la eksa grizona registarano kaj UEA-vicdelegito A. Manatschal kaj raportadis en *Svisa Espero* pri la disvastigo de Eo en sia kantono. Poste li transiris al Ido kaj redaktis la periodaĵon *Universala Framasono* (ĉ. 1921).

Jules PERLET (PERRELET)

1887-1964



Post la lernejoj en Fribourg kaj Sarnen/OW P. fariĝis ŝtata oficisto en Berno (Svisa Oficejo pri trafiko kaj ĝis 1952 sekretario de la Svisa Oficejo pri energio).

P. estis frua pioniro de la svisa Eo-movado, precipe fervojista. 1914-17 li estis ĝenerala sekretario de SES (sub →René de Saussure), LKK-ano de la 9a UK (Berno 1913), fervojista reprezentanto dum la 17a UK (Ĝenevo 1925). Li iniciatis la fondon de SAEF, kies unua prezidanto li estis ĝis 1930, apud funkcio kiel asesoro de IFEF. Krom tio P. elstaris kiel propagandisto, diplomita Eo-instruisto



kaj aŭtoro de modelaj Eo-lernolibroj, laŭ kiuj oni instruis Eon dum multaj jaroj (→Bibliografio). En 1923 P. enkondukis la Eo-instruadon en la klerigan lernejon de la bernaj dungitoj (Fortbildungsschule des Bernischen Beamten- und Angestelltenverbands). Li kompilis turisman varbfolion por la 31a UK (Berno 1939) kaj tradukis la tekston por la Eo-versio de la oficiala prospekto de la ĉokolada firmao *Wander, Taso da Ovomaltine fortigas ankaŭ vin* (1939).

→Berno →Fervojoj

René-William PERRENOUD

1904-1996



Post la lernejoj en Le Locle/NE kaj Tavannes/BE, kie vivis liaj gepatroj, P. vizitis la gimnazion kaj la universitaton en Neuchâtel, kie li licenciĝis pri komercaj sciencoj. En la sekva tempo, li helpis sian patron en ties maŝinofabro en Tavannes kaj en St-Quentin (Francio, 1929-35) kiel direktora sekretario. Post tio li helpis al sia patrino Louise P.-Jeanneret funkciigi privatan lernejon en Neuchâtel, kie la fakoj franca lingvo kaj dommastrumado estis instruataj al fremdlingvaj junulinoj. Daŭrigante la patrinan entreprenon, P. gvide aktivadis sur ĉi tiu kampo dum 35 jaroj. En 1970 li ekloĝis en Hauterive/NE.

Ĉar lia patrino praktikis Eon ekde la jarcenta komenco, ankaŭ P. konscie aŭdis ĝin almenaŭ de 1907 kaj malgraŭ diversaj agadinterrompoj neniam perdis la intereson pri la zamenhofa lingvo. Sekve li ĉiam denove perfektigadis siajn konojn ekzemple en vesperaj Eo-kursoj de Paul Humberst (1916) aŭ dum la arma servo en 1939 per la lerno-

libroj de →Edmond Privat. En 1951 P. revenis al la Eo-movado, studante la lingvon en kurso de →William Perrenoud laŭ ties libreto *En tempo rekorda*. Lia nomkolego, kiu neniel estis lia parenco, instigis lin aktivadi en la neŭŝatela EG kiel kasisto, sekretario kaj bibliotekisto - ĉi tiujn funkciojn P. plenumadis dum pli ol 30 jaroj. Kiam William Perrenoud estis prezidanto de SES P. alektiĝis kiel protokolanto kaj kasisto, plenumante tiujn funkciojn inter 1952 kaj 1974. En 1963/64 li apartenis al la triopo, kiu kolektive prezidis la landan asocion. Dum pli ol 20 jaroj P. prizorgis la franclingvaj eldonojn de la gazetara servo *Esperanto-Information*, kiujn →Arthur Baur redaktis en la germana lingvo por la ĵurnalistoj. Ekde 1955 P. estis membro de UEA kaj ekde 1957 ĝia neŭŝatela delegito. En 1958 li troviĝis inter la fondaj membroj de EES. Kiam en 1968 KCE estis starigita P. aktive kunlaboris kun →August Braun kaj →Claude Gacond kaj ĝis 1988 rolis kiel librotenisto de KCE kaj GEP. P. do estis unu el malmultaj svisaj e-istoj, kiuj ne nur tre longe vivis, sed ankaŭ konis Eon principe dum naŭ jardekoj.



Louise Perrenoud-Jeanneret

La patrino de P., *Louise P.-Jeanneret* (1880-1951), kiu naskiĝis en 1880 en Usono kiel filino de elmigrinto al Ameriko kun la celo fariĝi koloniisto, revenis en 1892 al Svislando kaj en 1922 fondis privatan lernejon por fremdlingvaj junulinoj, dezirantaj lerni la francan lingvon kaj formiĝi kiel dommastroinoj. Aktivante ankaŭ en virinrajtaj medioj, Louise P. lernis Eon en 1903 (supera ekzameno de SES en 1907). En 1917 ŝi gvidis Eo-

kurson por distri blindajn francajn soldatojn, kiuj restadis en Les Brenets/NE kaj helpis al aliaj Eo-lernantoj. Ŝi estis membro de la neŭŝatela EG kaj fine de la 1930aj jaroj iam redaktis *Svisan Esperon*.

→Neuchâtel →Kultura Centro Esperantista

William PERRENOUD

1898-1984



P. efektivigis studojn pri lingvoj kaj naturscienco en la universitatoj de Neuchâtel, Zuriko kaj Parizo, kiuj kondukis lin al la doktoriĝo. Poste li laboris kiel instruisto pri sciencaj fakoj unue en la duagrada lernejo de Cernier/NE kaj poste en la supera komerca lernejo en Neuchâtel, kie li instruis la francan lingvon al fremdlingvanoj (en tiuj lernejoj li gvidis ankaŭ Eo-lecionojn). Ĉi tie li ankaŭ intimiĝis kun la germana lingvo de Friedrich von Schiller, kies tradukisto kaj komentisto li fariĝis (i.a. li francigis la libron *Conducteur des peuples* de Schiller kaj verkis la antaŭparolon (aperis en Neuchâtel 1941). Dank' al liaj konoj de la latina lingvo aperis en 1965 lia Eo-traduko de la encikliko de Papo Paŭlo VI, *La Vojoj de la Eklezio (Ecclesiam Suam)*. P. lernis Eon en sia junaĝo (1912) pere de la instruisto →Edouard Ducommun, kiu ankaŭ inspiris lin kontribui al la perfektigo de la Eo-didaktiko. En 1919-20 li laboris en la Centra Oficejo de UEA en Berno. La superan Eo-ekzamenon P. trapasis en 1920. 1921-27 li deĵoris en la sekretariejo de la interregistaraj konferencoj pri la instruado de Eo, kiu okazis en Ĝenevo kaj Prago, ambaŭ sub la prezido de →Pierre Bovet, kaj li estis la oficiala tradukisto en la 3a kongreso de Universala Federacio de pedagogiaj asocioj en Ĝenevo

(1929). P. lanĉis ankaŭ kampanjon por Unesko kaj persone transdonis la raporton de tiu agado al Max Petitpierre, federacia konsilisto de Svislando inter 1944 kaj 1961, kiu akceptis lin kaj aliajn SES-delegacianojn en 1954 en Berno. P. ankaŭ aktive partoprenis la laboron de →IALA, fondita en 1924, kie li estis la persona sekretario kaj Eo-konsilanto de Alice Vanderbilt Morris. Sed ŝajnas, ke al P. ne plaĉis la disputoj inter diversaj planlingvistoj, tiel ke poste li rakontis negative pri sia IALA-sperto kaj ne aparte favoris la kreadon de →CDELI, en kiu li kredis vidi ilon por ne-esperantaj aktivecoj, timante ke ĝi naskos novan lingvoprojekton kiel okazis siatempe ĉe IALA. Despli fervore li apogis la ideon de la kreado de neŭŝatela Eo-biblioteko, esprimitan jam en 1953 (en la kvina eldono de *SE*), ĉar li zorgis pri la estonto de siaj propraj Eo-arkivaĵoj. Des pli varme P. bonvenigis la fondon de KCE kiel klerigejo por la e-istoj.

Lin disfamigis antaŭ ĉio la Eo-kurso →*La ora metodo* (Neuchâtel 1956). Ĉi tiu siatempe iom furora lernolibreto, praktikanta la principon de la ordigitaj radikoj, influis la metodikon de la Eo-instruado. La konkreta apliko de *La ora metodo* estis evoluigata en lia broŝureto *En tempo rekorda* (1960). Spite al ĝiaj malavantaĝoj, tiu kurslecionaro formis multajn e-istojn kadre de la aktiveco de EES, kiun P. kunfondis, kaj influis la metodikan agadon de KCE. Apogata de sia edzino *Daisy-Juliette Theis* (1898-1970), P. partoprenis en multaj regionaj kunvenoj, kiujn li riĉigis prelege. 1955-61 li elstaris kiel ĉeforganizanto de la internaciaj feriokursoj en la →Kastelo Münchenwiler/BE, kie li prezentadis sian teorion de la →*geonismo*, speco de interpretado de la interna ideo de Eo kun la ĉefaj celoj alvoki la konscian kreadon de tuteca homa kulturo kaj la praktika aplikado de Eo. En siaj sciencaj kaj filozofiaj priokupoj P., kiu entreprenis kvazaŭ-eldonejon kun la nomo Geoniaj Eldonoj, multe interesiĝis pri la evoluo de la universo kaj de la homaro kaj pri la demando kiel atingi pli da kohero inter tiuj du dimensioj. En tio influis lin la verko *Le géon ou la terre vivante* de Hélian Jaworski (1928) kaj poste la antropologiaj studoj de Teilhard de Chardin (1881-1955). La dramo de la geonismo de P. estis, ke ĝia

tro idealisma kaj profeta karaktero kaŭzis ne nur malkomprenon ĉe multaj samideanoj ne tro intelektaj, sed krom tio restis ankaŭ nefinita, nelaste pro la malsaniĝo kaj izoliĝo de ĝia aŭtoro.



William Perrenoud kaj Otto Walder dum Eo-ekskurso al Besançon en 1938



William Perrenoud kun Jules Gilliard (maldekstre) kaj Hans Herrmann en Berno en 1954

Jam ĉ. la jaro 1920 P. oficis kiel sekretario de SES, 1938-39 kaj 1954-57 eĉ estis ĝia prezidanto. Laŭ pritakso de →Claude Gacond, precipe lia trijara prezidanteco dum la 1950aj jaroj estis tre fruktodona, ĉar ĝi kaŭzis rimarkindan dinamikiĝon kaj koheriĝon de la svisa Eo-vivo kaj kontribuis pozitive la kunlaboron inter la svisaj e-istoj. P. admiris la verkojn de →Edmond Privat kaj Ivo Lapenna, tiama UEA-prezidanto, kiu en la jaro 1954 esence

kontribuis al la akcepto de la fama Eo-rezolucio de Unesko. La organo *SE* tiam prezentis la filozofiajn vidpunktojn de P., kiu „deklaris la internacian lingvon kiel kvaran ŝtupon post la eltrovo de la skribo, due de la litera alfabeto kaj trie de la presarto“. P. sincere ĝojis ankaŭ pri la prospero de la Eo-junularo kaj de ĝia organizo EJS, kiu estis starigita tiutempe.

Kiam en 1957 konservemaj membroj en SES rifuzis proponitan statutŝanĝon, kiu antaŭvidus la daŭrigon de la prezidanta mandato (ĝis tiam validis la rajto je nur unu trijara mandato) kaj per tio de la prezidanteco de P., la Eo-periodo de P. venis al sia fino. P. ĉesis frekventi la Eo-movadon, retiris sin al sia dometo en Montmollin/NE, najbare kun sia amiko →Marcel Jaccard, kun kiu li dediĉis siajn lastajn fortojn al ĝardenumado kaj legado. En januaro 1978 li sciigis al siaj geamikoj Heinrich Ringli kaj Gertrud Weigelt, ke li decidis verki du librojn, la unuan en la franca lingvo, la duan en Eo, kiu prezentos la sumon de liaj pensado kaj vivado. Bedaŭrinde P. ne plu havis la okazon realigi tiun planon. Fine de sia vivo P. perdis la memorkapablon kaj devis esti flegata en maljunulejo de Le Locle. Por CDELI povis esti savitaj multaj Eo-materialoj kun escepto de IALA-dokumentoj antaŭe detruitaj de P. mem.

→Neuchâtel →Geonismo →La ora metodo →SES

Tina PETER-RÜETSCHI

1904-1993



Post la gimnazio en Fetan/GR kaj la abiturienta ekzameno P. studis juron en la zurika universitato, kiun ŝi forlasis per doktora disertaĵo pri junulara punleĝaro. Kiel juristi-

no P. intense okupiĝis pri la problemoj de la civitaneco de svisinoj edziniĝintaj kun eksterlandano, kaj pri la enkonduko de la loĝejetaĝa posedo en Svislando (tiurilate ŝi publikigis gravan kajeron). La ĵurnalo *Neue Zürcher Zeitung* publikigis ŝiajn analizemajn artikolojn. Ofte ŝi partoprenis fakajn kongresojn en- kaj eksterlande kaj estis delegitino de la liberala partio.

Kiel multjara aktiva membrino de SES kaj de la zurika ES (honora membro en 1989) P. rikoltis internacian agnoskon en Eo-medioj, precipe kiam en 1951-61 ŝi lanĉis la t.n. Koordinitajn Eo-kursojn (KEK) en la zurika popolaltlernejo. En la pretigo de la instrumaterialo ŝin helpis →Fritz Liechti kaj →Werner Laederach, kiu gvidis la kursojn. La kursoj sukcese efektiviĝis samtempe en diversaj eŭropaj landoj. En la 64a UK (Lucerno 1979) ŝi membris en la komisiono pri virina agado (kun Julie Tonkin el Usono kaj Claude Nourmont-Moon el Luksemburgo), kiu aŭspiciis la pritemajn prelegojn.

→Instruado de Eo en Svislando →Zuriko

Claude PIRON

*1931. Loĝas en Gland VD



Post altaj komercaj studoj en Antverpeno, Belgio (1948-53) kaj la diplomiĝo en la traduklernejo de la ĝeneva universitato, P. laboris ĉe UN en Novjorko kiel tradukisto el la lingvoj angla, ĉina, hispana, kaj rusa al la franca kaj kiel redaktoro-protokolisto (1956-61). Kiel dungito de la Monda Organizo pri sano en Ĝenevo (1961-71) li aktivis en orienta Azio, en la pacifika regiono kaj en Afriko. 1956-61 kaj 1966-75 li studis psikologion kaj plenumis trejniĝon kiel psikanalizisto kaj psikoterapiisto (en la ĝeneva Instituto

Charles Baudouin). De 1971 P. laboris kiel privata psikoterapiisto nemedicina, agnoskita en 1988 de la vaŭda sandepartemento. De 1973 ĝis sia emeritiĝo en 1994 - en 1978 li fariĝis svisa civitano - li docentis en la psikologia kaj edukscienca fakultato de la ĝeneva universitato kaj en la Internacia Instituto de psikanalizo kaj psikoterapio i.a. pri la rilatoj inter emocia vivo, strukturiĝo de la personeco kaj disvolvo de la konaj funkcioj. Lige kun sia profesio P. gvidis multajn seminariojn kaj staĝojn aŭ prelege kontribuis en ili. P., kiu en 1999 translokiĝis de Coppet/VD al Gland/VD, plu aktivis kiel psikoterapiisto, ĉefe okupiĝante pri la trejnado de junaj psikoterapiistoj/psikanalizistoj, prelegante kaj gvidante staĝojn aŭ terapiajn grupojn.



Kelkaj libroj de Claude Piron

Kiam P., e-isto de 1943, laboris en Novjorko, li kunfondis la UN-EK, t.e. klubon por UN-funkciuloj (ĉ. 1957), kies unua prezidanto li ankaŭ estis. Dum la 60aj jaroj li reprezentis UEAn ĉe UN kaj rolis kiel UEA-delegito en Ĝenevo. Li partoprenis la aktivecojn de la ĝeneva EG La Stelo kaj de SES kaj estis redaktoro de *SE* (1963-66). En malferma letero (1975) al la direktoro de Monda Organizo pri sano li rekomendis Eon kiel taŭgan solvon de la lingva problemo de tiu organizo. P. estis rektoro de la Somera Universitato en Eo dum ties 32a sesio okaze de la 64a UK

(Lucerno 1979) kaj de IFA de KCE. En 1981 kaj 1983 li instruis Eon en la sanfranciska ŝtata universitato kadre de someraj kursoj. Internacie konata P. fariĝis pro siaj oftaj prelegoj en Eo-medioj kaj precipe kiel verkisto kaj aŭtoro de pli ol 20 originalaj libroj en Eo kaj pro aliaj gravaj publikigoj en kaj pri Eo. Sub la pseŭdonimo *Johán Valano* P. aperigis inter 1976 kaj 1982, ĉefe en la eldono Stefeto (Antverpeno/La Laguna), kvin krimromanojn en la fama 'Ĉu-serio', poste sekvis ankoraŭ la novelaro *Ĉu rakonti novele?* Alia famekonata teksto de P. estis eldonita sub la titolo *La Bona Lingvo* (1989). (→Bibliografio) P. gajnis plurajn premiojn: En 1955, kadre de la Belartaj Konkursoj de UEA, P. ricevis la poezian premion, kaj en 1993 sekvis la Premio Deguĉi. Lia ĉefa naci-lingva kontribuado rilate al la monda lingva problemoj kaj Eo estas *Le défi des langues. Du gâchis au bon sens* (L'Harmattan Paris 1994). La redakcion de PIV2 P. konsilis rilate la psikologian terminologion.



Claude Piron en Rolle, septembro 2003
(fotis S. Keller)

P. ĉiam elpaŝis kiel tre engaĝita pledanto favore al la planlingvo Eo kiel alternativo al la lingva kaoso en internaciaj organizoj, kies situacion li bone konas de interne; oni spertis lin kiel ardan preleganton kaj interesan rakontanton, kun multaj teoriaj konoj kaj prak-

tikaj spertoj pri psikologio kaj la monda lingva problemoj, du kampoj, kiujn li kompetente interrilatigis en sia interpretado de fenomenoj. En iu intervjuo P. diris, ke li bezonus almenaŭ tri paralelajn vivojn por fari ĉion, kion li devus (aŭ volus) fari. En 1998 UEA nomis lin honora membro.

La aktivecojn de P. ofte aktive partoprenis lia edzino →*Nicole P.* (*1934). Ankaŭ iliaj tri filinoj komprenas Eon kaj restis principe favoraj al ĝi, kvankam ili dume ne uzas ĝin.

→Ĝenevo →SES →KCE

→Bibliografio →Antologio

Nicole PIRON-SABATHÉ

*1934. Loĝas en Gland VD

P. pasigis sian infanecon en sud-okcidenta Francio, diplomiĝis pri angla lingvo en la universitato de Bordeaux kaj studis en la altlernejo pri politikaj sciencoj en Parizo. Ŝi estis dungita kiel tradukistino en UN, en 1980-98 ŝi instruis la francan lingvon al usonaj studentinoj de Smith College (Massachusetts, Usono) venintaj studi unu jaron en Ĝenevo kadre de aranĝo kun la ĝeneva universitato. 1987-99 P. estis ano de la komunuma konsilantaro de Coppet/VD. Nun ŝi laboras kiel volontulino en la hospitalo de Nyon/VD.

P. lernis Eon en la UN-EK kaj de tiam ofte partoprenis kun →Claude P., kun kiu ŝi edzi- niĝis en 1958, en diversaj Eo-agadoj.



En la fono ridas Nicole kaj Claude Piron inter ĝene- vaj esperantistoj (foto de A. Altherr-Perič)

Stanisław POCHANKE & familio

*1934. Loĝas en Wil SG



Post la studoj pri metalurgio en la krakova universitato (minist-fandista akademio) kaj la magistriĝo kiel inĝeniero, P. laboris kiel teknologo en metalurgia uzino en Katowice (Pollando) kaj kiel instruisto en mezlernejo en Bielsko-Biała. 1968-88 li aktivis kiel turisma ĉiĉerono en la regiono de Katowice kaj en la beskida montaro. En Svislando li laboris ekde 1988 kiel helpflegisto en psikiatrejo en Wil/SG.

P. estas aktiva e-isto, kiu plenumis multajn oficojn unue en Pollando kaj poste agadis en Svislando: en la 1960/70aj jaroj kiel vicprezidanto de la filio de Pola Eo-Asocio (PEA) en Gliwice, kiel sekretario de PEA en la silezia regiono, kiel prezidanto kaj kasisto de la PEA-filio en Katowice, kiel membro de la PEA-filio en Bielsko-Biała, kiel Eo-instruisto ktp. Li posedas du Eo-diplomojn (Csehmetoda seminario en 1959, polaj lernejoj instancoj). En 1981 PEA, kies dumviva membro P. estas, aljuĝis al li la titolon 'merita e-isto'. Post sia translokiĝo al Svislando li ekaktivis en EK Wil/SG kiel ties prezidanto kaj Eo-instruisto (1989-2005), krom membro de SES kaj UEA. Edzo de *Barbara P.-Grzywa* (*1944), patro de tri infanoj, denaske scipovantaj kaj parolantaj Eon: *Robert* (*1970), *David* (*1971) kaj *Veronika* (Vera, *1975).

→St. Gallen →Familioj



Patrino Barbara Pochanke, filo David kaj filino Vera

POLITIKO

La svisa P. estas iom komplika temo. La politika sistemo de Svislando baziĝas sur du pilieroj: a) la (di)rekta demokratio, en kiu la popolo povas, pere de t.n. iniciativoj kaj referendumoj, rekte influi la P.; b) la alte evoluinta federalismo kun la parta aŭtonomeco de la 26 kantonoj, kiuj partoprenas en la formado de la politika volo. En Svislando P. do efektiviĝas sur la niveloj de la konfederacio, kantonoj kaj komunumoj. Kvankam ekzistas la svisa registaro, kiu estas la ekzekutiva povo de la Svisa Konfederacio, pro ĝia federalisma strukturo la decidojn influas plej diversaj fortoj, krom la menciitaj ankaŭ ĉefe partipolitikaj, asociaj, bazdemokratiaj kaj administraciaj. La popolo portas la suverenecon rilate la ŝanĝon de la konstitucio kaj en voĉdono estas kvazaŭ ĉiam prava. Aliaj karakterizaĵoj de la svisa politika sistemo estas ekzemple la manko de ŝtatprezidanto kaj ĉefministro (la sepmembra federacia konsilio estas la kolektiva ŝtatestro), sed ankaŭ la fakto, ke la parte suverenaj kantonoj mem decidas pri tuta aro da aferoj kiel lernejoj, edukaj, kulturaj kaj lingvaj. En Svislando la impostoj estas fiksataj sur konfederacia, kantona kaj komunuma niveloj.

Dekomence inter la Eo-movado kaj la P. ekzistis interrilatoj en plej diversaj okazoj. La e-istoj esperis je la interesiĝo, bonvolo kaj subteno por Eo flanke de la P. kaj de unuopaj politikistoj kaj sendis al ili invitojn por partopreni Eo-aranĝojn aŭ leterojn, ke ili ekzamenu la eblecon enkonduki Eon en la lernejojn, kun diversaj rezultoj. Jen kelkaj ekzemploj:

En la fondkunveno de SES la 27an de septembro 1903 en Rolle/VD ĉeestis ankaŭ reprezentanto de la ĝeneva kanto (s-ro Thiébaud).

En 1913 la liberaldemokrato → *Emil Frey*, prezidanto de la Svisa Konfederacio en 1894 kaj oficanta direktoro de la Centra Oficejo de la Universala Telegrafa Unio, bonvolis akcepti la honoran prezidon de la 9a Universala Kongreso de Eo, okazinta inter la 24a kaj 31a de aŭgusto 1913 en Berno. En la ĉeesto de L.L. Zamenhof kaj de aliaj gravaj funkciuloj de UEA F. salutis la kongresanojn, esprimante la dankemon kaj admiron al Zamenhof pro lia granda verko. Same okaze de aliaj UK en Svislando la oficialaj politikaj aŭtoritatoj kutime sendis reprezentantojn por saluti la kongresanojn en la nomo de siaj instancoj. Kutime la Universalaj Kongresoj de Eo ricevis la altan protekton de grava ŝtata instanco kaj estis vizititaj de reprezentantoj de ŝtataj aŭtoritatoj.

En la 1920aj jaroj, dank' al la grandioza engaĝiĝo de → *Edmond Privat*, kiu mem estis socialista demokrato kaj kiu flegis fruktodonajn rilatojn kun edukinstancoj kaj diversaj politikistoj, la kantona registaro de Ĝenevo subtenis la eksperimentan enkondukon de la Eo-instruado en la sepan (lastan) klason de la unuagrada lernejoj kaj en la beletran fakon de la ĝeneva universitato (→ Instruado de Esperanto). Eĉ pli impona estis la atingo de Privat, ke la temo de la enkonduko de Eo en la lernejojn de la mondo estis traktata de → *Ligo de Nacioj*. Edmond Privat kaj → *Arthur Baur* reprezentis SESn en la Svisa Packonsilio kaj en la Svisa Asocio por Unuiĝintaj Nacioj.

En majo 1952, okaze de dutaga internacia junulara kunveno en Bazelo, estis laŭlegita la bondezira mesaĝo de Max Petitpierre (1899-1994), federacia ministro de Svislando (1944-61) kaj akceptita trilingva kongresa rezolucio, kiu sugestis la aprobon kaj aplikon de Eo kiel ilo por pli bona internacia kompreniĝo kaj rekomendis la instruadon de Eo en la svisaj lernejoj. La gazetoj *Basler Nachrichten*, *National-Zeitung* kaj *Arbeiterzeitung* raportis pri la evento.

La 2an de junio 1954, fone de la alprenota Unesko-rezolucio pri Eo en Montevideo, delegacio de SES (konsistanta el William Perrenoud, René Zollinger, Bruno Graf, Tina Peter-Rüetschi kaj Heidi Baur), estis akceptita en Berno de la prezidanto de la Svisa Federacia Konsilio Max Petitpierre (1899-1994), por atentigi la ministron pri la graveco de tiu

evento. En tiu aŭdienco ĉeestis ankaŭ Henri Perret, tiama prezidanto de la Svisa Nacia Konsilantaro (vd. SE 4/54).

Dum la kongreso de Svisa Fervojista Sindikato (SEV) en 1964 en Interlaken, partoprenata de 800 personoj, kaj en ĉeesto de oficialaj reprezentantoj de politikaj kaj fervojistaj instancoj kaj de la gazetaro, estis traktita rezolucipropono rilate la enkondukon de Eo en la lernejojn. (→ Fervojistoj)

De la favoro de ŝtataj instancoj dependis la ekzisto de la elsendoj de Svisa Radio Internacia (SRI), kies Eo-programo ekzitis inter 1946 kaj 1992 (→ Radio), sed ankaŭ la konstruado de KCE/GEP en La Chaux-de-Fonds (kvankam ĝi restis esence privata projekto) kaj la inaŭguroj de *Esperantoweg* en Romanshorn/TG (1965), de *Piazzetto Esperanto* en Locarno-Solduno/TI (1985) kaj de la bushaltejo *Gymnase-Espéranto* en La Chaux-de-Fonds/NE (1980-90aj jaroj).

En principo la Eo-asocioj ligitaj al UEA konsideras sin politike neŭtralaj kaj malvolonte alprenas politikajn vidpunktojn aŭ rezoluciojn (kiel en la kazo de la protesto kontraŭ la milito en Jugoslavio, vd. SES informas 2/1992).

Tio ne malhelpas al la e-istoj aŭ Eo-simpatiantoj agadi en neneŭtralaj organizaĵoj aŭ eĉ esti politike aktivaj. Jen kelkaj ekzemploj:

Membroj de la socialista aŭ socialdemokrata partio estis → *Auguste Forel*, → *Georges Stroele*, → *Jean Wenger* en Neuchâtel kaj → *Arnold Bohren*; poste ĝiaj aktivuloj fariĝis ankaŭ → *Marcel Erbetta* en Biel-Bienne kaj → *Claude Gacond*, kiu aktivadis kiel komunuma politikisto en La Sagne/NE kaj kiel deputito de la neŭŝatela parlamento dum kvar jaroj. En 1959 ankaŭ lia edzino → *Andrée Gacond-Giroud* estis elektita kiel membro de la komunuma konsilio de La Sagne/NE sekve al pozitiva voĉdono de la civitanoj de la neŭŝatela kantono favore al la civitana egaleco de la virinoj. Same ŝia fratino *Cosette Cop (Sandoz)-Giroud* agadis 1969-92 kiel politikistino de la socialista partio en La Chaux-de-Fonds, okupante mandaton kiel ĝenerala konsilistino en la leĝodona asembleo de tiu urbo (1969-72).

Nicole Piron, edzino de →*Claude Piron*, estis ano de la komunuma konsilantaro de Cop-pet/VD (1987-99).



Socialistoj: Gacond, Erbetta, Bohren, Cop

→*Eugène Failletaz*, unua prezidanto de SES, rolis en la P. kiel radikala deputito de la vaŭda granda konsilio (1917-40) kaj reprezentis la laŭzanan prefekton (1928-43).

Dum 30 jaroj la instruisto kaj verkisto →*Dante Bertolini* aktivadis en Tiĉino ankaŭ kiel politikisto, sur loka kaj urba niveloj, kadre de la liberala partio; 18 jarojn li estis membro en la komunuma administrejo de Locarno. Tuta aro de tiĉinaj e-istoj estis gravaj politikistoj: *Enrico Balmelli*, emerita lokomotivestro kaj unua prezidanto de TEL, 1968-72 okupis la oficon de urba konsiliano kaj membro de la plenuma instanco en Bellinzona. Ankaŭ lia Eo-kolego, *Fernando de Faveri*, emerita SFF-mekanikisto en Bellinzona, estis membro de la urba konsilio de Bellinzona kaj de la tiĉina kantona parlamento. Kiel Balmelli kaj de Faveri, ankaŭ *Edo Tognini* membris en la bellinzona urba konsilio kaj sidis en la tiĉina kantona parlamento, kiun li eĉ vicprezidis kaj kie li ankaŭ prezentis proponon esplori la eblon enkonduki la eksperimentan instruadon de Eo en la tiĉinajn lernejojn. (→Tiĉino)

Kiel membro de la radikala partio, →*Maurice Favre* apartenis al la urba konsilio de La Chaux-de-Fonds (1948-79), al la granda konsilio de la neŭŝatela kantono (1949-79) kaj oficis kiel prezidanto de la radikala partio de la neŭŝatela kantono (1957-70). En 1962 li estis membro de la direkta komitato de la radikala partio de Svislando kaj en 1985 kandidato por la konsilio de kantonoj (malgranda ĉambro) de Svislando. Dank' al li Eo estis diskonigita en la rondoj de la radikala partio. *Ernst von May* (1922-2004) en Oberuzwil/SG iam estis membro de la komunuma konsilio de sia loĝloko kadre de la

liberaldemokrata partio. Ankaŭ la zurika juristino →*Tina Peter Rüetschi* reprezentis la liberalan partion.

La instruisto kaj e-isto *Henri Favre* (1878-1961) fariĝis en 1920 membro de la komunuma konsilio de la urbo Le Locle, kies prezidanto li estis dum 1924-27. Ankaŭ li apartenis al la kantona konsilio de Neuchâtel (1922-45), kiun li prezidis unu jaron en 1937. Lia porkampanara organizo nomiĝis Nacia Progresema Partio (kiu antaŭ la elektoj en 1985 unuiĝis kun la liberala partio kaj fariĝis pli dekstra ol la radikala).

→*Guido Appius* estis deputito nome de la kristandemokrata popolpartio en la kantona parlamento en Bazelo (1980-92), okupiĝante pri la problemoj de la maljunuloj, pri leĝofarado kaj misuzo de la generada teknologio.

Kiel demokrato →*Eduard Spielmann* (1870-1938) partoprenadis la politikajn agadojn en urbo, kantono kaj konfederacio en Berno kaj estis funkciulo de la berna sekcio de la Eŭropa Movado.



Radikal-liberaluloj: Failletaz, Favre, Bertolini, Peter

Lydia Woog-Scherer (1913-2003), la komunista aktivulino kaj edzino de Edgar Woog (1898-1973), membro de la zurika urba konsilantaro, nacia konsilisto kaj kunfondinto de la Partio de la Laboro de Svislando (PdA, komunistoj), lernis en la 1930aj jaroj Eon por korespondi kun sovetiaj e-istoj, en la espero, ke iam la tuta mondo povu interkompreniĝi en unusola lingvo.

Kiel pensiulo la laboristo-librotenisto →*Maurizio de Sassi* fariĝis membro de la Partio de la Laboro de Svislando (komunistoj). Kiel aktivulo en la komunista partio, pacmovado kaj sindikato *Carlo Nicolodi* estas ekde 1985 estrarano de Internacia Kolektivo E-ista Komunista (IKEK) kaj peranto de *Internaciisto*. Ankaŭ *Dieter Rooke* (*1948) apartenas al tiu medio.

En sia lerneja tempo *Dietrich Weidmann* (*1960) aliĝis efemere al la maoistaj komunistoj. Iam poste li transiris al la Juna FDP (liberaldemokratoj). En la 1980aj jaroj li partoprenis la maldekstran junularan protestmovadon en Zuriko kaj en 1990 fondis senpartian movadon por kandidatiĝi por la svisa nacia parlamento.

Pro kritika artikolo en svisa gazeto kontraŭ la hitlera reĝimo → *Walter Giannini* estis kondamnita je malliberejo. Kiel liberpensulo li estis ano de la politika partio Landesring der Unabhängigen (LdU).

→ *Giorgio Silfer* 1966-72 agadis en la junulara federacio de Itala Respublikana Partio. Ekde 1998 Silfer propagandas la Esperantan → Civiton, kiu en si mem portas multajn trajtojn de politika partio.

Pluraj e-istoj estis anoj de la → Civilservo Internacia, ĉar ilia politika konvinko ne permesas deĵoron en la armeo.

Pri la sinteno de la svisa P. rilate Eon:

Krom pozitivaj estas konataj ankaŭ kelkaj kazoj, en kiuj la P. negative konkludis aŭ raportis pri Eo.

Lige kun la internacia peticio pri Eo, kiu estis subskribita de 895'432 unuopuloj en 76 landoj, ekzamenita de Unesko kaj pludelegita al la membroŝtatoj, SES ricevis en 1953 de la Svisa Departemento (ministerio) pri internaj aferoj la kopion de *Raporto pri la enketo rilate la internacian peticion favore de Eo en Svislando*. Tiu raporto, kiu konkludis ekstreme negative pri Eo, resumis la reagojn kaj opiniojn pri Eo kiel neŭtrala universala lingvo de diversaj instancoj de 22 svisaj kantonoj kaj 27 aliaj gravaj organizaĵoj kaj institucioj i.a. el la medioj banka, kamparana, turisma, komerca, instruista, scienca, jurista, ĵurnalista, virina, sindikata. Laŭ tiu enketo, ĉiuj kantonoj krom Neuchâtel kategorie neis, ke ili favorus aŭ dezirus favori la instruadon de Eo en la publikaj lernejoj kaj malatribuis al tiu lingvo, ke ĝi iam ajn povos ludi la rolon de mondlingvo aŭ akiri signifon en internaciaj rilatoj. Kiel argumentoj servis, ke en Svislando pere de Eo ne ekzistas laborlokoj, kaj la aserto, ke krom en la kazo de kelkaj etaj grupoj, Eo ne estas praktikata en Svislando. Tial la oficiala Svislando taksus neŭtralan universalan lingvon kiel Eo nenecesa kaj ne kredus, ke tia lingvo konsiderinde faciligus la

rilatojn inter la popoloj kaj akcelus la socian progreson.

En sia responda letero, subskribita de Werner Laederach la 23an de junio 1953 al la ministerio, SES esprimis sian pozicion. Emfazante sian bedaŭron, SES skribis, ke la ministerio traktis la Eo-demandon tute unuflanke kaj prisilentis la pozitivajn faktojn. Oni bedaŭris, ke la ŝtato ne sufiĉe serioze konsideris la temon kaj ke la analizo ne estas objektiva kaj la konkludoj plenaj de antaŭjuĝoj kontraŭ Eo.

Plurfoje okazis, ke e-istoj, kiel ekzemple tiuj de Lucerna Eo-Societo, sendis al politikistoj leterojn, en kiuj ili proponis aŭ postulis la enkondukon de Eo en la lernejojn kiel alternativon al la valida instruado ekzemple de la franca lingvo. Kompreneble ĉi tiuj paŝoj devis resti sensukcesaj, tamen ili estis utilaj, ĉar la ŝtataj instancoj klarigis en siaj respondoj la oficialan sintenon de la politikaj instancoj.

La 27an de novembro 1981 Charlotte Ecklin, membro de Lucerna Eo-Societo, ricevis la sekvantan respondon de la Departemento pri justico kaj polico (tiam estro: Kurt Furgler) al sia letero, en kiu ŝi formulis la sugeston, ke Eo estu enkondukita en ĉiujn lernejojn almenaŭ kiel libervola fako:

„La Svisa Konstitucio deklaras en sia Artikolo 116 la germanan, francan, italan kaj romanĉan lingvojn kiel naciajn lingvojn de Svislando. La oficialaj klopodoj devas koncentri sin pri tiuj lingvoj. La unua celo de la fremdlingva instruado sur ĉiuj niveloj estas ebligi kaj akceli la interkompreniĝon inter la loĝantoj de Svislando en unu el la naciaj lingvoj. Kompreneble krom la naciaj lingvoj estas instruataj ankaŭ la malnovaj kulturlingvoj de Eŭropo kaj la mondvasse utiligataj lingvoj. Laŭ nia scio Eo nuntempe povas esti instruata en neniuj publika lernejo. Leviĝas la demando, kiom dezirinda estas la enkonduko de kursoj por lingvo, kiu – eĉ kun la plej bona intenco kaj humana strebado – ne estas integrita en vivanta kulturo. Ĉiukaze por Svislando la flegado de ĝis nun vivanta lingve kultura 'ekumeno' devas havi prioritaton ankaŭ estonte. Pri la neceso kaj utilo de la enkonduko de Eo-kursoj estus konvinkendaj unuavice la kantonoj, kiuj posedas la lernejan suverenecon. Kiel rilate la demandon de la

modera minuskligo, la Konfederacio havas malmultajn eblecojn kontribui al la diskonigo de Eo.” (trad. aK). En la sama letero sekvis la rekomendo, ke kun tiaj proponoj oni direktiĝu al la Konferenco de la kantonaj eduk-direktoroj.


Kiam en 1992 la svisaj e-istoj baraktis kontraŭ la planita abolo de la Eo-elsendoj de Svisa Radio Internacia (SRI), en kio ankaŭ politikaj konsideroj ludis esencan rolon, la e-istoj devis dolore konscii pri la malgrava statuso de Eo. Sekve al la politikaj ŝanĝoj en Orienta Eŭropo la respondeculoj de SRI trovis sufiĉe konvenan kaj komfortan argumenton por la likvido de Eo en sia sendoprogramo. Jen ĉerpaĵo el la respondo, kiun Fritz Liechti, tiama vicprezidanto de SES, ricevis de SRI la 2an de novembro 1992 al letero, en kiu oni protestis kontraŭ la abolo de la Eo-elsendoj de SRI: „Koncerne la forfalon de la Eo-elsendoj en la eŭropa programo de SRI, la pravigo ne troviĝas ĉe la sendostrukturo, sed ĉe la signifo de Eo en si mem. La prioritataj celregionoj de la Eo-elsendoj de SRI estis tute klare Orienta Eŭropo kaj la iama USSR. Ni estas konvinkitaj, ke oni faris en la pasintaj jardekoj gravan kontribuon al la internacia interkompreniĝo, kaj ni dankas al la svisaj e-istoj pro ilia valora apogo. Kun la malfermiĝo en Oriento la aferoj baze ŝanĝiĝis. Kvankam la problemoj de la interkompreniĝo ankoraŭ tute ne estas solvitaj, ne eblas nei la fakton, ke nuntempe la angla, germana kaj franca lingvoj troviĝas sur la plej bona vojo forpuŝi Eon el ties origina rolo. Krom tio nuntempe partneraj rilatoj kun la amaskomunikiloj en Oriento estas pli gravaj ol la tradiciaj servoj de la internacia radio sur mallongaj ondoj...” (trad. aK). Similtonan respondon Andreas Künzli ricevis al sia ĉi-koncerna letero al la tiama prezidanto de la Svisa Konfederacio, Adolf Ogi (1993), en kiu li starigis la postulon nuligi la decidon de SRI. Post nova elpaŝo de kelkaj svisaj e-istoj kun la celo postuli la reenkondukon de la Eo-programo ĉe SRI sekvis senkompata konfirmo de SRI, ke Eo ne plu havas lokon en la lingvaro aplikata de la radiostacio kaj ke la jura fundamento por la kreado de Eo-elsendoj mankas, ĉar la svisa registaro donas la koncesion por la funkciigo de SRI-elsendoj.

Kurioza historio estis la t.n. ‘slipa skandalo’ (germanlingve: Fichenaffäre), kiu fine de la 1980aj jaroj skuis la svisan socion. Ĉi tiu skandalo evidentigis, ke dum la malvarma milito centmiloj da svisaj civitanoj estis observataj de la svisa sekreta (politika) polico kiel suspektataj personoj, ĉar ekzemple ili havis kontaktojn kun politikaj maldekstruloj aŭ kun la komunismaj landoj. Kiam Andreas Künzli, tiam studento pri slavistiko kaj orienteŭropa historio en la zurika universitato, mendis sian propran slipon por kontroli la informojn kiujn ĝi entenas, li fariĝis perpleksigita kaj konsternita atestanto, ke ankaŭ Eo estas menciita lige kun lia korespondado kun nome kaj adrese indikita bulgara e-isto !

→Laboristoj →Fervojistoj →Naturamiko
→Kristanoj →Svisa Radio Internacia
→Civito (Esperanta) →Civilservo Internacia

Edmond PRIVAT

1889-1962




P. estis unu el la multflanke aktivaj personecoj kaj talentaj intelektuloj konataj en Svislando (precipe Romandio) kaj respektataj ankaŭ internacie. Kiel studento, historiisto, ĵurnalisto, verkisto, biografo, pedagogo, filozofo, oratoro li disponis pri ampleksaj teoriaj scioj kaj praktikaj spertoj pri diversaj temoj. En siaj roloj kaj funkcioj de universitata instruisto, radio-redaktoro, mondvojaĝanto, pacaktivulo, mondĉivitano, kiel partoprenanto en multaj konferencoj P. okupis gravajn poziciojn sen karierisma ambicio kaj konatiĝis kun sennombraj eminentuloj de sia epoko. Kiel advokato de subpremataj popoloj, kiel mondfederalisto, idealisto, socialista demokrato kaj kiel pledanto por la rajtoj de

homoj, popoloj kaj lingvoj P. estis admirata kaj laŭdata, sed liaj ideoj estis neeviteble ankaŭ miskomprenataj kaj kritikataj.

Familia deveno: Lia patro, Jean-Emile P. (1848-1926), estis ano de origine langvedok-hugenota protestanta familio de francaj pedagogoj (el Nîmes), kiuj fuĝis al Ĝenevo en 1714. Lia patrino Melicent Joséphine Lüscher (1854-1945) estis de svisa-angla deveno.



Edmond Privat kiel infano kaj junulo



La gepatroj de Edmond Privat kaj Edmond Privat fotita en Usono en 1907

Studado, profesia kariero kaj idealisma agado: 1901-7 P. vizitis la kalvinan kolezion en Ĝenevo kaj faris la abituriantan ekzamenon pri klasika beletro. En 1909 li elektis la francan, germanan kaj anglan lingvojn kiel studobjektojn en la ĝeneva universitato por studi lingvosciencan (ĉe Antoine Meillet), literaturon kaj belartojn (ĉe Romain Rolland) en Sorbonne en Parizo; en 1911 li licenciĝis pri angla filologio. En 1912 li fariĝis privatdocento pri anglaj lingvo kaj literaturo en la ĝeneva universitato, en 1912-13 li estis instruisto en la lernejo Bedales apud Petersfield (Britio). 1913-16 li laboris kiel publicisto en


Parizo kunlabore kun la periodaĵo *Temps*. En 1915 li ekkorespondis kun Romain Rolland (1866-1944), kun kiu li iĝis amike ligita, li vojaĝis tra Aŭstrio-Hungario kaj Pollando kiel gazetara korespondanto, lanĉante kampanjojn por la politika sendependiĝo de Pollando (pro tio P. ricevis la pseŭdonomon Privatovski). En 1918 li doktoriĝis pri *La pola insurekcio de 1830 kaj ĝia eĥo en Okcidento*. En 1920-21 li rolis kiel tradukisto de la angla kaj franca lingvoj dum la du unuaj kunvenoj de →Ligo de Nacioj. Lanĉinte la kampanjon kun Nansen por la malsatuloj en Ruslando en 1921-22, inter 1922 kaj 1927 P. okupis la oficojn de parola tradukisto de Lord Cecil kaj de Nansen kaj kiel honora konsilanto kaj pli poste vicdelegito de Persujo sub la princo Arfa-ed-Doŭleh Mirza Riza Ĥan (1848-1936) ĉe Ligo de Nacioj. En 1925 P. kunfondis Ĝenevan Radion kaj la Internacian Komitaton por la defendo de la koloniaj popoloj. Dum 1931-32, okaze de akcepto de Mahatma Gandhi kaj dum vojaĝado kun li tra Francio, Svislando, Anglio, Italio kaj Hindio, P. organizis, en sia funkcio kiel prezidanto de la Komitato por sendependeco de Hindio, kampanjojn por pledi por la politika sendependiĝo de Hindio. Ree en Svislando, 1933-45 P. instruis la anglan lingvon en la supera komerca lernejo en Bellinzona/TI (loĝante en Locarno). 1945-59 P. laboris kiel profesoro pri anglaj lingvoj kaj literaturo en la neŭŝatela universitato.

P. kunlaboris kun la socialistaj gazetoj *Le Droit du Peuple* (ekde 1919), *La Sentinelle* (ĝis 1956), kun la kooperativaj periodaĵoj *Le Coopérateur genevois* (1929-44) kaj *(La) Coopération* (1931-62), ĵurnalo, kiun legis dommastrinoj, studentoj kaj instruistoj. Kunlabore kun →Eric Descœudres en 1944-49 P. gvidis la periodaĵon *L'Essor*, kiu alparolis pacaktivulojn kaj religiemulojn.


En 1911 P. edziĝis en La Chaux-de-Fonds/NE kun la franca e-istino *Angèle Fal-lot*. En 1926 ili divorcis. Poste P. edziĝis kun →*Yvonne Bouvier*, fratino de Paul Bouvier. Ambaŭ virinoj estis aktivaj e-istinoj.

Filozofiaj influoj: De sia evangelia-protestanta ĉirkaŭaĵo pietisma, sektema kaj minoritata, en kiu P. edukiĝis, li emancipiĝis pli kaj pli, kvankam li aprezis en si mem la liberalan ideon de la protestantismo. Jam

1906-7 li filozofiumis, mem prelege elpaŝante en ĝenevaj intelektaj rondoj pri la temo 'Dio kaj Mamono'. Iom post iom P. konatiĝis kun la verko de plej diversaj teoriuloj: li studis la doktrinojn de la tiĉina anarkiisto Louis Bretoni (1872-1947), legis la instruojn de la zurika teologo Hermann Kutter (1863-1931), kiu reprezentis la germanan kristanan socialismon, kaj sekvis la pacpredikadon de Paul Pettavel (1861-1934) en La Chaux-de-Fonds. P. tre interesiĝis ankaŭ pri la demandoj pri separo inter eklezio kaj ŝtato (kiel ekzemple en Francio en 1905 aŭ en Ĝenevo en 1907). La renkontiĝoj kun la filozofo kaj psikologo William James (1842-1910) en la harvarda universitato (1908), unu el la fondintoj de la pragmatismo kaj radikala empirismo, kun la elstara franca socialisto kaj oratoro Jean Jaurès (1859-1914) en Parizo (1909), kun Sri Pandit Jawaharlal Nehru (1889-1964) kaj Rabindranath Tagore (1861-1941) aparte impresis lin. En Usono P. ne nur ekkonsciis pri la principoj de toleremo kaj nacia modesteco, sed ankaŭ komprenis, ke Eŭropo ne estas la centro de la mondo. En 1909 P. aktive partoprenis la jubileon pri la ĝeneva eklezia reformisto Jean Calvin (1509-64). Diversajn lin influantajn ideojn P., kiu mem fariĝis pacaktivulo, socialisto (1920), mondciivitano, civilservisto, kvakero (1937), naturisto kaj vegetarano, do trovis krom ĉe Romain Rolland (1866-1944), Woodrow Wilson (1856-1924), Pierre Céréssole (1879-1945, →Civilservo Internacia), Mohandas Karamchand Gandhi (1869-1948), ankaŭ ĉe Thomas More (1478-1535), Lanza del Vasto (1901-81), Danilo Dolci (*1924), Abato Pierre (*1912), Louis Lecoin (1888-1971), →Auguste Forel (1848-1931), →Pierre Bovet (1878-1965), Fridtjof Nansen (1861-1930), Vinoba Bhave (1895-1982), Thomas Garrigue Masaryk (1850-1937), Lev Nikolajevič Tolstoj (1828-1910) k.a. kaj kompreneble nelaste ĉe L.L. Zamenhof (1859-1917), la aŭtoro de Eo.



Privat kun Gandhi, 1931-32



Libroj de Privat pri Gandhi kaj federalismo

Esperanto: La tuta vivo, ekzistado kaj penso de P. ne estas imagebla sen Eo kaj sen lia aktivega, ampleksa kaj tre varia laboro por la zamenhofaj idealoj, lingvo kaj movado. Post sia e-istiĝo en 1903 P. ankoraŭ ekzamenis la lingvojn La Langue Bleue (aŭ Bolak), kiun Léon Bollack prezentis en 1899, kaj Idiom Neutral de Waldemar Rosenberger el la jaro 1902. Sed lin rapide forlasis la intereso pri tiuj tro arbitre konstruitaj projektoj kaj, profunde konvinkita pri la supereco de Eo, li plene ekdediĉis sin al ĝi. Fakte P. eksciis pri la zamenhofa lingvo hazarde per lernolibro, kiun evidente la konata ĝeneva filozofo → Ernest Naville (1816-1909) havigis al lia patro, kiel pedagoga kolego. En la liceo P. devis perplekse konstati, ke ankaŭ lia diskreta kamarado → Hector Hodler (1887-1920) jam komencis okupiĝi pri la zamenhofa afero. Tiel startis intima kaj pasia kunlaboro inter ambaŭ amikoj, kiu unue en 1903 kondukis al la lanĉo de la gazeto *La Juna E-isto* kaj al la fondo de Unuiĝo de Junaj E-istoj de Ĝenevo. En 1905 P. partoprenis la 1an UK en Bulonjo-ĉe-Marjo (Francio), kie li surprizis la

ĉeestantojn per sia oratora talento. Unu jaron poste la 17-jara P. kunorganizis la 2an UK en Ĝenevo kiel ĝia ĝenerala sekretario. Li kunhelpis organizi ankaŭ la 3an UK en Kembriĝo (Britio) kaj poste vizitis aliajn kongresojn. Lia vojaĝo al Britio, Francio kaj Nordameriko en 1907 kun la celo i.a. instrui kaj propagandi Eon kunvenigis lin kun famaj politikistoj, eĉ kun la usona prezidento Theodore Roosevelt, vicprezidento Fairbanks kaj la senatanoj de la ŝtato Ohio (en 1913 li renkontis ankaŭ la usonan prezidenton Woodrow Wilson). Reveninte de la unua usona Eokongreso en Chautauqua/NY en 1908, P. daŭrigis propagandi Eon en Francio. Same li defendis tiun lingvon en 1909 kiel helpsekretario de la 6a Internacia Kongreso pri psikologio en Ĝenevo. Pli kaj pli li famiĝis ankaŭ kiel verkisto kaj pedagogo. Kadre de la unuaj Floraj Ludoj dum la 5a UK (Barcelono 1909) li gajnis premion pro la poeziaĵo *Sur vojo de l'vivo*. En 1910-14 li fondis kaj aktivigis la Internacian Eo-Instituton (IEI) kun ties sidejoj en Ĝenevo, Parizo kaj Novjorko (IEI denove funkciis sub la nomo Cseh-Instituto de 1930 ĝis la dua mondmilito). Okaze de sia vojaĝo al Ruslando (1911/12) P. prelegis en la Eo-societoj de Kievo, Ĥarkovo, Moskvo kaj Sankt-Peterburgo, kie li estis akceptita de la ĉefministro de la Cara Imperio, V.N. Kokovcov, lige kun skandalo ĉirkaŭ la rusa e-isto A.A. Postnikov, kaj vizitis d-ron L.L. Zamenhof en Varsovio. Kiel disĉiplo de Zamenhof P. pluevoluigis kaj konkrete aplikis la ideojn de la juda okulkuracisto en ĵurnalismo kaj politiko.



UK Kembriĝo en 1907: Privat malantaŭ L.L. Zamenhof (supre)

P. lobiadis favore al Eo ĉe Internacia Laboroficejo, Universala Telegrafa Unio kaj en →Ligo de Nacioj, kie li devis alfronti la kontraŭ-esperantan sintenon de →Gonzague de Reynold. En tiuj organizoj P. iniciatis kampanjojn favore al la uzado de Eo kiel laborlingvo aŭ favore al ĝia enkonduko en lernejojn, li kunaranĝis, parte kun →Pierre Bovet, internaciajn konferencojn en kaj pri Eo (edukistoj en Ĝenevo en 1922, komercistoj en Venecio en 1923, radio-produktantoj en Ĝenevo en 1924, pacagantoj en lernejoj en Prago en 1927). Kadre de la 17a UK (Ĝenevo 1925) P. inaŭguris la unuan Someran Universitaton en Eo.

Dank' al la engaĝiĝo kaj energio de P. en la 1920aj jaroj malfermiĝis esperoplena perspektivo por la instruado de Eo en la sepa (lasta) klaso de la unuagradaj lernejoj en la ĝeneva kantono (1921) kaj en la beletra fakso de la ĝeneva universitato (1928/29).

En la jaroj post la fondo de UEA en 1908 far Hodler ankaŭ P. apartenis al ĝiaj unuaj aktivaj kunlaborantoj: En la revuo *Esperanto* de UEA, kiun P. gvidis kaj redaktis inter 1920 kaj 1934, aperis liaj klarvidaj, elegantstilaj artikoloj. 1923-28 P. estis prezidanto de la →Internacia Centra Komitato de la Eomovado (ICK) kaj 1925-28 de UEA mem (ĝia honora prezidanto en 1951).



Angèle Fallot kaj Edmond Privat (Moskvo 1912)



Edmond kaj Yvonne Privat-Bouvier



Privat en Bielo en 1959 (maldekstre)

1924-27 P. rolis ankaŭ kiel direktoro de la sekcio pri elparolado kaj premioj de la Eo-akademio. La demokrato kaj neŭtralulo P. ĉiam strebis, ne ĉiam sukcese, unuecigi la diversajn kverelemajn flankojn, ne hezitante serĉi la kunlaboron ankaŭ kun SAT kaj ties periodaĵo *Laborista E-isto*. En la 1920aj jaroj P. reorganizis kaj gvidis ankaŭ la svisan Eomovadon kiel prezidanto de SES (en 1927 ĝia honora membro). Ankaŭ dum kaj post la dua mondmilito P. daŭre laboris por Eo. P. estis tre ŝatata preleganto dum svisaj kaj internaciaj Eo-aranĝoj, ĉar kun sia oratora talento li havis la kapablon vekti la atenton de la aŭskultantoj, entuziasmigi kaj konvinki ilin.

Alia granda merito de P. estis, ke en 1946 ĉe Svisa Kurtonda Radio (poste nomata Svisa Radio Internacia SRI, →Radio) komenciĝis la

disaŭdigo de Eo-elsendoj. P. mem realigadis ilin ĝis sia morto en 1962. En 1955 li fondis la Universalan Ligon, kiu uzis Eon por disvastigi la mondfederalisman ideon. Nelaste P. estis ankaŭ la spirita preparanto de CDELI kaj KCE/IFA/GEP, en kiuj li esperis vidi la relanĉon de la agadoj, kiujn siatempe plenumis la Internacia Cseh-Instituto kaj la Somera Universitato en Eo.

En Svislando ĉefe → Claude Gacond, kunfondinto kaj direktinto de KCE kaj arkivisto de CDELI, kiu persone bone konis P. kaj kunlaboris kun li, adoptis liajn spiritajn inspirojn kaj sugestojn, studante lian verkaron kaj plurkampe klopodante daŭrigi ĝin.

Neue Zürcher Zeitung nomis lin „elstara sviso“ (NZZ, 9.11.1972, tagmeza eldono). Ankaŭ inter la adeptoj de aliaj planlingvoj P. estis respektata persono. P. reprezentis Eon en →IALA, organizo funkcia inter 1924 kaj 1951. Pri Ido li esprimiĝis malfavore, sed al Edgar von Wahl (1867-1948) li skribis, ke li tre ŝatas lian laboron kaj lian lingvon → Occidental-Interlingue. Ankaŭ la Interlingua-gazetaro apreze omaĝis la meritojn de P. okaze de lia morto. Kaj la dana lingvisto Otto Jespersen (1860-1943), kiu persone renkontis P. okaze de invito ĉe Alice Morris (1874-1950), montris sin impresita pri la „flama elokventeco“ de tiu svisa e-isto. La tro frua morto de P., akcelita de tragika akcidento, sendube estis grandega perdo por la Eo-movado.



Privat dum Zamenhofa Vespero en 1951



Privat kun esperantistoj



Privat oratoras kaj interparolas kun la svisa registarano Max Petitpierre (dekstre)



Karikaturo pri Edmond Privat en 1925


En la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds okazis tri gravaj ekspozicioj pri →Edmond Privat. (→Bibliotekoj kaj ekspozicioj)



Titolpaĝo de Svisa Espero dediĉita al Privat kaj Gandhi




Privat en sia oficejo



La libro *Aventuroj de pioniro* en Esperanto kaj la itala lingvo



Karikaturo pri la mondvojaĝanto Privat




Libroj de Privat en Esperanto

P. verkis multajn librojn, precipe en la franca, angla kaj en Eo, ĉi tiuj apartenas al la klasika Eo-literaturo kaj ankoraŭ nuntempe estas ŝatataj, legataj kaj ofte citataj, kvankam en have ne ĝisdatigitaj. La libroj de P. estis tradukitaj en la lingvojn germana, angla, nederlanda, itala, hispana, portugala, dana, norvega, sveda, ĉeĥa, pola, ĉina, japana ktp.

Liaj originalaj libroj *Historio de la lingvo Eo* (1912 kaj 1927), *Vivo de Zamenhof* (1923), →*Interpopola Konduto* (1935), *Federala sperto* (1958), *Aventuroj de Pioniro* (1962), *Vivo de Gandhi* (1967) estas la plej signifaj ekzemploj de lia valora verkaro. Ĉe *Esprimo de Sentoj en Esperanto* temas pri resumo de kurso farita en la ĝeneva universitato de Ĝenevo dum 1929-31. La skribstilo de P. estis laŭdata de multaj fakuloj kiel Ferenc Szilágyi, Reto Rossetti kaj →Henri Vatré. La ĉi-lastaj skribis: „P. estis poeto ne nur ĉar li skribis versojn, sed precipe ĉar li metis poezion en sian prozon, kiu posedas apartan gracon,“ kaj atribuis al li la honoron, ke „historie, li estas la unua moderna aŭtoro en nia originala prozo“, ĉar „tute novan kaj individualan koncepton li prezentas pri la stilo. Por li necesas ne nur ion diri, sed ankaŭ krei impreson de belo, de poezio.“ (vd. *SER* 5-6/1988). La dokumentaro kaj libraro de P. konserviĝas kadre de aparta Fondaĵo Edmond P. kaj en CDELI en la urba biblioteko en La Chaux-de-Fonds. (→Yvonne Privat-Bouvier; →CDELI)

Pluraj sciencaj esploristoj interesiĝis pri la vivo kaj verkaro de P.: Mahommad Farrokh (Ĝenevo 1989), Emmanuelle Houlmann (Fribourg 2005) kaj Perla Martinelli (Torino 2005) verkis libron pri li, kaj Claude Gacond publikigis en 2005 artikolon pri P. en *Biographies Neuchâteloises 1900-1950*. (Tome 4, Hauterive). La pola e-isto Tomasz Chmielik el Świdnik (Lublin) indeksis kaj eldonis la gazetaran artikolon franclingvan de P.

→Ĝenevo →Radio kaj Esperanto →Politiko
 →Ĵurnalismo →SES →KCE →CDELI
 →Bibliografio →Antologio



Grava studo pri Edmond Privat



Pollingva libro pri Edmond Privat

Yvonne PRIVAT-BOUVIER

1891-1977



La dua edzino de P. estis la filino de E. Bouvier, ĉefredaktoro de *Tribune de Genève*, kaj la fratino de Paul Bouvier. Junaĝe ŝi restadis en Britio por lerni la anglajn lingvon kaj morojn. Komence de la unua mondmilito ŝi laboris libervole en agentejo de la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco por helpi la militkaptitojn. Post la milito ŝi laboris kiel arkivistino ĉe Ligo de Nacioj kaj tiukaze ekrilatis kun →Edmond P. Komunaj interesoj kondukis la paron al la geedziĝo (1926) kaj tra la vivo. Tuj post la kuniĝo ili ekloĝis en Veytaux/VD. 1934-45 la geedzoj vivis en Tiĉino, ĉar Edmond P. laboris kiel instruisto en Belinzona. Dum la dua mondmilito Yvonne P. denove helpis la rifuĝintojn. En 1945 ŝi transloĝiĝis kun la edzo al Neuchâtel, kie li trovis postenon kiel universitata docento. De 1974 ŝi vivis en la ĝeneva hejmo St. Paul.

Yvonne P. estis aktiva e-istino (ekde 1920), kiu fidele kunlaboris kun sia edzo en ties poresperanta agado, akompanante lin dum multaj Eo-aranĝoj, same dum la vojaĝo kun Mahatma Gandhi al Hindio. Ŝi partoprenis la lokan agadon, kunlaboris kun SES (kiel kassistino). Post la morto de Edmond P. en 1962 la vidvino ekokupiĝis pri la heredaĵo de sia forpasinta edzo, kreante la senstatutan intereso-klubon 'La Amikoj de Edmond P.' kaj donacante liajn dokumentaron kaj librojn al la urba biblioteko en La Chaux-de-Fonds, kie estis starigita la aparta Fondaĵo Edmond P. Ĉi tiu fondaĵo estis prezidata de André Sandoz, prezidinto de la urbo La Chaux-de-Fonds; kiel vicprezidanto oficis →Claude Gacond, kiel sekretario Fernand Donzé, kiel membroj de la fondaĵo kunvenis Yvonne P. (vidvino),

André Tissot, John Nussbaum kaj →Eric Descoedres. Pierre Hirsch, iama kuratoro de Fonds Edmond P. kaj fakulo pri Jean-Jacques Rousseau, Mallarmé kaj Romain Rolland, aŭtoris plurajn studojn pri P., kiujn li riĉigis per siaj sciencaj komentoj, same kiel la leterojn de Eugène Lanti al Edmond P.
→Ĝenevo →CDELI

PSEŬDONIMOJ

Pluraj e-istoj uzadis P., ankaŭ L.L. Zamenhof, t.e. plumnomon aŭ kaŝnomon precipe kiel verkisto, por eviti ke oni rekonu sian propran nomon. Jen kelkaj ekzemploj: Eble la plej konataj P. en nuntempaj Eo-medioj estas →*Giorgio Silfer* por Valerio Ari, *Parzival'* por →Serge Reverdin kaj *Johán Valano* (resp. *Balano*) por →Claude Piron; la ĉi-lastia iam uzis ankaŭ la P. *S.P. Renteaux* (legu: Espe-ranto). Krome, →Henri Vatré praktikis la P. *Henri Baupierre* kaj →Tazio Carlevaro kaŝiĝis malantaŭ la nomo *Edo Bernasconi*. →Hans Jakob verkadis por *Esperanto* artikolojn sub diversaj P. (*Beppi Basler*, *Georges Agricola*, *François Hayotte*, *Rideamus*, *Allobrogo*). Ĉe →Hector Hodler en la franca lingvo lia redaktora P. estis *Homo. Liang-Ĉu-Vaj* estis la P. de →Edmond Privat por liaj artikoloj pri-aziaj. La nomo *Antido* servis al →René de Saussure kiel P. kaj programo por liaj reformprojektoj. →Georges Stroele aplikis la P. *Goso. Mad Mevo* estis la karesa titolo por →Madeleine Stakian, kaj malpli konate estas, ke ankaŭ ŝia armen-devena edzo →Ardachès Stakian portis la armenecan P. *Ani Arax*. La franc-devena tradukistino Maria Milsom elektis la P. *E. Ramo*. →Hans Herrmann estis konata kaj ŝatata kiel magiisto sub la nomo *Hoho*, kaj la dulingva poemaro *Zauberwort Weltrekord* de →Heinrich Lorenz aperis sub la P. *Lorenz Urbano*. →Alphonse Matejka subskribis siajn artikolojn per *Franko Veramido* kaj *Scorpion*, →André Schild nomis sin *Scuto* kaj →Marcel Pesch adoptis la P. *Marcelo Persiko*, kaj la efemera planlingvo Parlamento de Georges Perrier estis publikigita sub ties P. *Geo Ferry*.